Poemo de Utnoa

de *Abel Montagut*

Nicola Ruggiero

Poemo de Utnoa

- Abel Montagut
- 7 kantoj, 7095 versoj
- sciencfikcia epopeo
- Teksto ricevita de eksterte-rano Daa-35
- Citaĵoj, aludoj el tutmondaj epopeoj



La lokoj

- Goba
- Naje kaj Efiedi
- Tero / Blusfero
- Ŝinaro
- Ur, Uruk, Babel
- Dilmun kaj ties popolo

Mappa dell'antica Mesopotamia
© The Porzy's Web
Hattusa
Turchia
Lago Van
Urartu
Lago Urmia
Tigri
Khorsabad
Ninive
Nimrod (Kalah)
Assiria
Assur
Harran
Mitanni
Ebla
Emar
Siria
Ugarit
Cipro
Mar Mediterraneo
Monti Libano
Megiddo
Mari
Eufrate
Monti Zagros
Behistun
Mê-Turan
Babilonia
Sippar
Babilonia
Borsippa
Nippur
Shuruppak
Uruk
Ur
Eridu
Sumer
Susa
Elam
Persia
Golfo Persico
Persepoli
0
200 km

La tempo

- Diluvo okazinta 3100 a. K.
- Naje sep jarojn ĉirkaŭ la Tero
- Du jaroj ĝis asteroido kolizios
- Transkorpaj vojaĝoj / tempa paradokso

Rolantoj

- Utnoa, Uttu Noa, Noa: ĉefheroo
- Laŝmu, adopta frato de Utnoa

- Emme Soraa, por la *emieco*
- Roa Numuo, por la *agaeco*
- Inna Sooje, konstatos agaecon, sed ekdubos

Kuriozaĵo: Utnapiŝtim la Gilgameŝa arketipo



el: http://www.garone.net/tony/utnapishtim.html

Unua kanto
Enkonduko (1-16)

Naŭton mi himnos kaj universe faman arkeon
kiuj elsavis vivon el tutplaneda diluvo.
Multon li trasuferis dum ĉarpentado de ŝipo,
hezitojn kaj ĉagrenojn daŭrajn fortbruste li venkis,
ĝis ondoj urbojn kovris kaj tutan teron inunde.
Homoj kaj bestoj en ŝlimfundo fordrone pereis.

Ĉiela Muzo, rakontu nun pri l' veraj eventoj
kiam elŝvelis maroj kaj la kaoso tumultis.
Ĉu ĝi fatalis nepra aŭ oni povis eviti?
Ĉu kataklismon mondan diaĵo pune provokus
pro flama venĝdeziro kontraŭ milkrima genero?
El altoj alparolu, ĉion klarigu volonte.

Bazaj kondiĉoj

- Kia voĉo estas la rakontanto?
- Utnoa: heroo aparta
- Interplektiĝo de du mondoj: gobda, blusfera
- Kiu ideologio?
- Al kiu popolo estas celata la Poemo?

Dua kanto
349-365

Sed Noa plue dubis en sia koro profunde.
Samkiel leopardo senzorge kuŝas en ombroj
ĉe lago kie trinkas ĝia idaro ludema,
kaj ili ne rimarkas, apud la bordoj petolaj,
ke larĝenuka kobro tra herboj ruze glitadas;
je l' susurado sibla, ĝi streĉe levas orelojn
kaj ungojn eltirinte antaŭ serpenton aŭdace
saltas kaj komenciĝas lukto kun ŝanco varia,
same ŝancelaj pensoj en Uttu rampis animen
kaj tiam li replikis al kamarado ĉi-vorte:

-Ho Laŝmu, vi ja pravas: temas pri l' generacio sepa post la militoj. Tamen ĉu ĝuste ni devas la taskon entrepreni? Krome, ĉu vere realas l' insulo praa? Ĉu ĝi ne estas revo de niaj avoj, ia pensaĵo mita aŭ nura legendo por konsoladi korojn, por trankviligi ĉe premoj, ĉar multe tra la jaroj nia popolo suferis?

La abela komparo

- ĉ. 50 tiaj
- besto kaj homo
- tra multaj versoj, riĉaj je bildoj

Tria kanto
Vivo en Naje

(8-15)

Ili laboris pace en plezurdonaj okupoj,
vojaĝis kaj sin distris per sia ludo kutima,
la arto de *oksuo*. La kolektivo posedis
pensmanieron gregan kaj amon al la gefratoj,
ardan deziron kore, pliperfektigi la reton
socian, ĉar konsciis frenezo - spili la vandon
de komunuma ŝipo, sub mensperturba pelado
de egoism' absurda.

**oksuo*: sporta kaj intelekta ludo (3, 36-42; 77-152)

52-58
(...)La tago labora
estis mallonga, kiel por ĉiuj Naje loĝantaj,
oscila inter tri kaj kvar horoj.
(...)
Ilia organizo estis kompare simila
al abelujo (...)
73-74
tiel en Najstacio ĉiu laboris utile
dum limigita tempo, kun distribuo laŭsaĝa.

Nupto en Naje

3, 431-559

445 Evue edziniĝos al Busla, filo de Inna.
466 "Vi ja ne trovos pacon en via stato geedza,
se antaŭ ol kurbigi vian tegmenton ovale,
antaŭ ol viŝi puraj la vazojn ŝtale kromitajn
kaj antaŭ la fortondo de l' umbilika fadeno
el milda uterfrukto, vi ne esploris abisme
l' animon de l' parulo. Se tion zorge vi faros,
kalejdoskopos, kiel mirinda flaŭro kaŝiĝas
en arbaregprofundoj de nekonataj ideoj."

Kia racieco?

- Gobdoj/Gobanoj *emiaj*
  racieco = robota pens- kaj ag-maniero, sensenta?
- Blusferanoj/teranoj *agaaj*
  pasiaj, buĉemaj, ĉu genetike tiaj?

Kvara kanto

- Roa Numuo konspiras kun Arunni
  "Ve, kia domaĝo, se fulmradie nur eblus
  forfandi la nomadojn kaj ilin tute nuligi!
  Sed plenumendas strikte l' Ajuba leĝo rigora,
  kontraŭe ni prikulpus ekzilkondamnon eternan
  aŭ humiligon rangan en komunuma civito.
  Ne licas interveni rekte, sed sole fortune."
- Profetino Filge, reĝino Ŝabda, Ur-urbo

- Dilmunidoj konstruas la ŝipon
- Alveno de Ur-soldato, azil-serĉe
- Subita atako al la kampadejo
- Morto de Laŝmu, talenta ĉarpentisto

"Kiu plu fajlos ĉize la serpentkapon aeran
kaj gvidos nin kuraĝe por la konstrua laboro
de nia alta ŝipo? Ho protektinto de bestoj,
nur viaj protektitoj, vin ĝuste tiuj atakis.
Vi brunan tigron helpis el senkompata pafarko
kaj ĝuste tiu sama vin vundis ŝire repage."

Li poste, senkonsole, la kampadejon ekvagis
kaj fine supreniris, dum kovris nokto profunda
ĉiujn arbodensejojn kaj la rivero murmuris,
al monto apudstara, sub longaj eĥoj otusaj.
Sur abruptaĵo roka en la lunlumo lamentis
kaj tie li plu restis la tutan nokton en ombroj.

Kvina kanto

- Inna Sooje ekdubas pri la agaeco de la teranoj.
- Nova asembleo Ajuba post malkovro de trompaj agoj far Roa
- Rajtigo de la *anoŭdo*, drogo, *"brile blanka, pulvore kristalkuba"*
- Unua transkorpa vojaĝo tra galaksioj kaj stelsistemoj

Hokusajo
La granda ondo

Nejdaj gvidantoj

- esprimo de spiritforto supera
- ĉiuj konsistigas nur unu solan unuon

1. Valmikio, mita aŭtoro de Ramajano
2. Hokusajo, pentristo
3. Fidiaso, skulptisto
4. Sklodovska, Marie Curie, fizikisto kaj kemiisto
5. Akenatono, faraono
6. Sunĝata Kejta, imperiestro de Manding
7. Nezaŭhtezoma, Meŝik-imperiestro
8. Armstrong, astronaŭto
9. Blankbarbulo, kun hele bruna tuniko

1066-1107

-Ho Uttu, la nomado, kiun la fatoj elektis:
vi vidis niamonde aferojn nur virtualajn,
mirigajn espereblojn de l' universa naturo.
Vi spektis speciale kreaĵojn arkitekturajn,
ĉar tiuj ĉi elstaras antaŭ la homaj okuloj
kaj ilin kunproduktis la tuta terkolektivo,
tamen en ĝi troviĝas multnombraj alimediaj,
kiujn malkovrus sole esploro plie penetra.
Se tiajn, je l' venonto, la homo krei kapablas
tio signifas certe, ke li grandecas anime

kaj indas je saviĝo el minacanta detruo.
Sed, krome, kion diri pri l' geniuloj apartaj
de l' estonteca mondo, spiritkulmino resuma
de l' tuta hompopolo? Ĉi tiuj povus ekesti
neniel se ĝi misus, sed ili sprosos abunde,
ĉar kolektiva kerno kapablas verve vivigi
ĉi tiajn esceptulojn, kiuj sendube ne gajnis
sian meriton, kvazaŭ el neniaĵo fariĝus,
sed estas pintrivelo kaj konkretiĝo reala
de la internaj fortoj el tuthomara talento.

Do se naskiĝos homoj en iuj mondregionoj
kiaj Gotamo, Laŭzi, aŭ Mahometo, Mahatma
Gandhi, Tagor, Homero aŭ Leonardo da Vinĉi,
Stravinski kaj Ajnŝtajno, kiaj Lulio, Joŝua,
kaj Lumba aŭ Ĝibrano, kiaj Huajna, Neruda,
Edison, Luter, Borĝes, aŭ la Sepika Mareko,
sennombraj famkonataj aŭ anonimaj eterne,
ĉu la homaro tera ne estas rajte savinda,
supera ekzistaĵo, evoluonta ĝis altaj
sferoj de la spirito, en nur konstanta progreso?

Se homoj malaperus io esenca ja mankus
al la naturo monda, la universo bedaŭrus,
kaj plu neniam eblus la perditaĵon akiri.
Ho, Uttu, savu homojn de l' finofara detruo,
tio de vi dependas, de l' entrepreno kuraĝa.
Persistu malgraŭ penoj kaj suferado lupunga.
La brila silueto iĝas pli svaga subite,
kaj jene li aldonas al la nomado peturĝe:
-Adiaŭ, ho Utnoa, la espereblo de ĉiuj,
ĉarpentu goferaĵon por ke ĝi pretu flosonte,
kiam sur sekajn grundojn ruliĝos maro droniga.
Pri via celo kosma, homido, fide memoru.

- Sed la doloro tro fortas en Noa kaj li bruligas la ŝipon

  La ŝipo disfaladis ĝis reduktiĝi je braĝoj
  kaj fulgaj traboj restis sur herbo sange makula.

Sesa kanto

- La postvivantaj tribanoj formigras en arbarojn, kie ili korŝirate migradas. Ili fine haltas ĉe la monto Urartu
- En la ĉielo Roa kaj Arunni jubilas.
- Emme parolas al siaj familianoj, li pluveturos serĉi alian ekloĝeblan planedon.
- Li ekdubas pri la supereco de Goba, bazita sur supertekniko, kaj komparas ĝin malfavore kun la artoj kaj variaj riĉoj de la Tera homaro.

- Revenas tribanoj, forlasintaj Utnoan apud Babel, kiuj rakontas pri siaj afliktoj dum la sieĝo ĉirkaŭ Nineve en ligo kun aliaj nomadaj triboj, kie ili estis amase masakritaj.
- Kelkaj eskapis kaj nun proponas sin por helpi je la konstruo de la ŝipo.
- Utnoa spertas akran doloron kaj pliiĝas la ombro en lia korprofundo.

6, 1000-1017

Samkiel raba ŝarko en oceano velura
dente diskarnas membrojn de elfalinta ŝipano:
ĉi tiu malespere je helpo raŭke kriegas,
tamen kompaniuloj el la ferdeko rigardas
senpove, okulstreĉe, dum akvo sange purpuras,
ĝis fine la maristo mergiĝas glute sub ondojn;
aŭ kiel knabineto, kiun pikdenta kajmano
kaptis je l' nuda kruro, dum ŝi tollave laboris,
kaj ŝin svenintan portas al subkaverno proviza,

kie, rekonsciante, ŝi povas spiri ĉar, ene,
plafonon ne atingas la frida akvosurfaco,
sed palpe, en tenebro, kun malespero ŝi timas
revenon de l' vorulo ŝin dispredonta pomembre,
tiel Utnoa spertis akran doloron enpulme,
pri l' fratoj memorante, pri Tubal, Cila, Naama,
kiujn li jam ne povis iele helpi ĉe misoj.
Densaj, nebulaj ombroj kovris la monton Urartu
kaj same ili regis en korprofundo de Uttu.

Sepa kanto

- La vintro pasas, revenas la printempo, sed Utnoa ne volas formigri el la rifuĝejo apud Urartu.
- Jiŝka, bofilino de Roa, vizitas lin kaj diras, ke ŝi antaŭsentas danĝeron; ŝi superrigardos la situacion ĉe la Dilmunidoj.
- Oba, fratino de Laŝmu, kaj Jubal, frato de Utnoa, provas konvinki Utnoan rekonstrui la ŝipon.

- Utnoa sendos kelkajn homojn al la urbo Eridu por konsulti temple profetojn por eltrovi la volon de la dioj.
- Utnoa kaj Oba enamiĝas kaj anoncas sian gefianĉiĝon.
- Roa iras mem por esplori la menson de Utnoa kaj konstatas lian entreprenemon.
- Jubal revenas kaj raportas aŭguron pozitivan por ekago.
- Utnoa decidas ekiri al Eridu por tie konstrui la savŝipon apud la rivero Gihun proksime al la maro.

- Utnoa kaj Oba celebras sian nupton kaj ekzalta ĝojo regas en la kampadejo de la Dilmunidoj.

"La vintro jam forpasis, neĝaroj monte degelas,
leviĝu, amatino, kaj mia bela, ho venu!
Florplenas ĉiuj branĉoj, paradas bunta sezono,
trilanta turtoparo en densaj frondoj arias,
figarbe ekmaturas miela frukto regale.
Leviĝu, amatino, kaj mia bela, ho venu!
Vian aspekton montru kaj helan voĉon aŭdigu,
per milda ekrigardo vi min kortuŝis unue.
La amon ne estingos eĉ superakvaj inundoj
kaj ĝin ne fordronigos elverŝiĝanta rivero.
Leviĝu, amatino, kaj mia bela, ho venu!

- Roa decidas interveni kaj uzi la anoŭdan drogon.
- Roa mem gvidos nejde Utnoan sur infereskaj planedoj *"regionoj uvaŭmaj"*.
- Hororaj vizioj reprezentas la violenton kaj la murdeman naturon de la teranoj.

1224-1244

Sekve antaŭ l' okuloj de la nomado leviĝas
muroj pikdrate retaj de barakara punejo,
kie milopojn gase oni sisteme buĉadas,
senkulpajn demanditojn tenajlas bruske senungaj
dum lante senhaŭtigas infanojn ŝire kriantajn;
antaŭ gepatroj gapaj knabinojn oni perfortas,
kun propra patro kuŝi ilin je l' fino devigas
kaj poste pafmortigas sub ĉies vido mitrale;
portigas en kazerno rokpecojn nepre senuzajn
ĝis alta ŝtonamaso, kaj sekve ŝvite samloken,

al homoj kadavrecaj, figuroj oste kadukaj,
volmankaj ĝis ne emo de si forpreni la vivon.
Samkiel smilodonto sur kornan uron eksaltas,
kiu stumblinte glitis en lagon peĉe bituman;
per dentoparo sabra rabbesto breĉas aorton,
dum ankaŭ pravulturoj, antaŭflarante kadavrojn,
sur dorsojn mergiĝantajn grake sin ĵetas avide,
sed ĉiujn glugle sorbas opake nigraj oleoj,
kungluiĝante ŝlime en viskozecan unuon,
same ĉiuj esperoj en Uttu morne pereis,
vidante la hororojn de la homaro futura.

- Utnoa, elĉerpita post la teruraj spertoj, konsentas ke indus ke la homaro dronus por ke la tuta kosmo rajtu spiri libere.
- Utnoa revekiĝas en la brakumo de Oba, kie li tuj forgesas ĉion el la droge trudita memesploro.

- Li rakontas al Oba sonĝon kaj petas ŝin ĝin interpreti:
  ke li vidis hakilon fali el la ĉielo apud Eridu kiu pikiĝis en la grundon kaj multaj homoj alvenis por ĝin observi. Tiun hakilon, dutranĉan, li prenis kaj metis antaŭ la piedojn de Oba kaj ekkuŝis sur ĝin, kaj poste Oba ĝin kaptis kaj liveris al li, ke ĝi fariĝu lia ĉiama kompaniulo.
- Oba interpretas la sonĝon de Utnoa tiel, ke ĝi instruas pri la necesa ĉarpentado ĉe Eridu malgraŭ ĉiuj afliktoj, ke Utnoa neniam plu retroiru de la misia tasko.

-Verŝajne -li respondas-, ho mia bela, vi pravas.
Dum tiuj migraj tempoj ni per sufero hardiĝis
kaj fine ni jam pretas ĉiom elsarki malamon,
malgraŭ ke restaj spuroj en nia sino venenas.
Sed ili malaperos kaj forviŝiĝos anime
ĉe niaj posteuloj en iu tago venonte.
Eĉ se la nunaj homoj estas instinkte kruelaj,
ilia koro celos iom post iom al amo.
Ĉiu respektos fraton en harmonia naturo.

Kaj, post generacioj, nepoj kun miro reaŭdos
pri raboj kaj perfortoj, militoj, sangaj agresoj,
ĉe kiuj antaŭuloj sin perarmile fibuĉis.
Kaj ili, pridubante, hezite kredos apenaŭ,
ĝin pensos legendaĵo, nur fabelita rakonto.
Ni voju plendecide, por posteuloj ekiru:
eĉ se ni malvirtemas, ili future plibonos.

Dankon!